

CxEA-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxiuj rete atingeblaj CxEA-membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. Invito de CxEJ al la HODIAUxA Internacia Vespero en Brno
2. ESperanto dum Tago de la lingvoj en Praha-Modřady
3. KAEST - plenplena de intereseĝaj prelegoj
4. La 18-a Kultura Festivalo en Ústí nad Labem
5. Esperanto-arangxo en 2007
6. Mesagxo de cxe flelegitino de UEA por Cxehxio
7. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)
8. Atentigo de Petro Chrdle

1. !!! Invito de CxEJ al la HODIAUxA Internacia Vespero en Brno
Inter 4-a kaj 10-a de novembro okazas en Brno-Komín trejnseminario de CxEJ kaj E@I kun temo "Lingvoj en interreto". Partoprenos 23 esperantistoj el 9 landoj. Cxiuj esperantistoj estas invitataj viziti nin, sed alvenonte nepre unue interkonsentu kun Marek Blahuš (tel. 777252487, rete cxej@blahus.cz). Speciale indas veni lunde la 6-an ekde 19:30 al la Internacia vespero, tauxga ankaux por neesperantistoj. Detaloj cxe organizanto aux en gazetara komuniko pri la seminario:

<http://esperanto.blahus.cz/cxej/ecxei-brno/gazetarkomuniko.doc>

2. Esperanto dum la Tago de la lingvoj en Praha-Modřany
Jam trian fojon okazis cxijare la 26-an de septembro enkadre de la prezento de multaj lingvoj okaze de la Tago de lingvoj prezento ankaux de Esperanto. En Gimnazio en la praga urboparto Modřany en du grupoj sinsekve (ke cxiu studento povu partopreni prezenton de du diversaj lingvoj) cxeestis entute pli ol 50 interesatoj. Pri Esperanto, pri gxiaj ecoj kaj ebloj kaj ankaux iom pri la E-movado diskutis kun ili la prezidanto de Praga junulara E-klubo Tomáš Břicháček kaj vicprezidanto de CxEA Petro Chrdle. Temas certe pri sekvinda metodo kiel disvastigi la informojn pri Esperanto inter junuloj.

3. KAEST - plenplena de intereseĝaj prelegoj
Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) okazos en Dobřichovice jam cxi-semajnfine. La buntecon de la programo kaj resumojn de la prezentotaj kontribuoj vi povas ekkoni rigardante <http://www.kava-pech.cz/kaest>. Post la konferenco - kiel jam tradicie - aperos belaspekta prelegkolekto, en kiu cxiun kontribuon sekvos resumoj en la angla, la germana kaj Esperanto.

4. La 18-a Kultura Festivalo en Ústí nad Labem

La kultura festivalo en Ústí okazos cxijare de la 8-a ĝis la 10-a de decembro 2006, kune kun la 27-a Ĉeĥa-Saksa tago. Gxi estos dedixita al la 100-jaraj naskiĝjubileo de Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr. Pli da informoj kaj aligxilojn vi povas ricevi cxe Miroslav Smyčka, m.smycka@seznam.cz

5. Esperanto arangxoj en 2007

Al nia alvoko en pasintaj du CxEA-retkomunikoj ne venis ehxo, kiu suficxus por kunmeto de Arangxo-kalendaro por venonta jaro. Organizantoj, bv. kompreni, ke sen scio de bezonataj indikoj, nome la nomo de la arangxo, la loko, la dato kaj la kontaktadreso (plej bone reta) ni ne povas vian arangxon diskonigi pere de retkomunikoj (kaj samtempe pere de www.esperanto.cz). Informu la redaktoron de la Retkomunikoj al chrdle@kava-pech.cz.

Hodiaux do almenaux mencio de 4 gravaj internaciaj arangxoj venontjare en Cxehxio kaj 1 pri UK:

2007-05/30-06/03: La 5-a kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj. Seč (30 km sude de Pardubice). Informoj: aeh-ikeh@volny.cz

2007-06/30-07/06: Ekoturisma renkontigxo por pied-turistoj kaj biciklantoj. Radošov apud Karlovy Vary, Informoj: chrdle@kava-pech.cz

2007-07-29/08-14: Komuna flugo al la 92-a Universala Kongreso al Jokohamo (Japanio). Informoj: chrdle@kava-pech.cz

2007-09-12/16: Konferenco de IKEK (Internacia Kolektivo de Esperantistoj-Komunistoj), informoj: dieter.rooke@tiscali.ch

2007-09-24/30: Internacia Paroliga Semajno (InPaSem), kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj, Dobřichovice, Informoj: chrdle@kava-pech.cz

6. Mesagxo de cxeflegitino de UEA por Cxehxio: estigxu individua membro de UEA por la jaro 2007!!!!

Cxi jare la nombro de individuaj membroj de UEA superis 6000 (same kiel en 2005) kaj ankau vi povas esti unu el tiuj esperantistoj por la venonta jaro.

Kiel membro de UEA :

- vi apartenas al komunumo de esperantistoj en 120 landoj -
- vi subtenas esperanto-movadon tra la mondo
- vi estas aktuale informata (pere de la Jarlibro 2007 kaj revuoj depende de via kategorio)
- vi gxuas malplialtan kotizon por partopreni UK-on au IJK-on

La kotizoj por 2007 estas fiksitaj jene:

La kategorio MG: individua membro kun Gvidlibro (la unua parto de Jarlibro) tra la Esperanto-movado 200,-Kč La

kategorio MJ(-T): individua membro kun Jarlibro (kaj gxis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago) 490,-

Kč La kategorio MA(-T): individua membro-abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto 1220,-Kč

La kategorio SA: simpla abono al la revuo Esperanto, sen la membreco en UEA 770,-Kč La kategorio Kto: abono al la

revuo Kontakto, sen la membreco en UEA/TEJO 460,-Kč

Vi povas pagi la kotizon cxe ajna filio de Poštovní spořitelna au cxe preskau cxii filio de Česká pošta. La konto estas 195230825/0300. „Variabilní symbol“: al unuaj kvin punktoj enskribu numeron de via CEA-legitimilo (se vi ne estas membro de CEA simple enskribu kvin nulojn kaj atentigu min pri via pago) kaj poste por pluaj kvin punktojn enskribu 06941. „Konstatní symbol“ estas 0379 kaj la nomo por la konto: Český esperantský svaz. Post via pago plej bone informu min pri gxi pere de interreto.

Se vi ne ankoraŭ membrigxis en UEA dum antaŭaj jaroj vi bezonas pleningi aligxilon kiun vi petu cxe mi. Mi gxoje atentas vian aligxilon al UEA por la venonta jaro. Amike salutas vin Lucie Karešová Lucie.Karesova@seznam.cz, posxtelefone 603 444 828

7. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) organizas cxi-semajne en Brno sian unuan internacian esperanto-seminaron, kunlabore kun [E@I](#) (detaloj en alia kontribuo). La seminario estas senpere sekvota per partopreno de 13 seminarianoj en KAEST en Dobřichovice. Komence de oktobro tri membroj de CxEJ (Dáša CHVÁTALOVÁ, Tomáš BŘICHÁČEK kaj Tomáš KLAPKA) sukcese partoprenis en la lingvaj ekzamenoj de ILEI/UEA en Dobřichovice (paralele kun InPaSem). Gratulon! Samtempe Marek BLAHUŠ vojaĝis al Belgio. Li gajnis premion en konkurso kaj profitis la okazon por cxiutage renkontadi lokajn esperantistojn kaj diskuti pri Esperanto kun gravaj EU-funkciuloj. Raporto aperos poste.

Artikolo "Salupon el Capajebo" pri IJK 2006 de Dan MRÁZEK aperis en revuo Esperanto 2006:09.

En la cxehxa versio de www.lernu.net aperas reklambendo pri CxEJ (supre, kie gxi alternas kun aliaj reklamoj).

En Brno ekfunkciis Brna klubo de CxEJ, okaze de kunveno de lokaj komencantoj kun juna franca komencantino Aline, kiu vizitis Cxehxion.

Vidu novan pagxon de la klubo cxe

<http://esperanto.blahus.cz/cxej/?brno>

CxEJ ankaŭ engaxigxis en la kampanjo kontraŭ intencata nuligo de la esperanto-elsendoj de Radio Polonia, sendante oficialan protestleteron al la pola ambasado en Prago. La teksto kaj cxiuj ceteraj aktualajxo pri cxehxa junularo legeblas cxe

<http://www.esperanto.cz/cej>

8. Atentigo de Petro Chrdle

Bv. scii, ke vendrede la3-an de novembro inter la 1-a kaj 11-a horo pro paneo de mia interreta provizanto perdigxis cxiuj remesagxo, kiuj estis adresitaj al chrdle@kava-pech.cz aux info@kava-pech.cz. Se vi hazarde sendis mesagxon tiutempe al unu el la menciitaj retadreso, sciu, ke ili ne estis liveritaj kaj resendu gxin denove.

Antauxdankon. Petro Chrdle